

Esperanto estas socia fenomeno, ĉefaj etapoj

Claude Gacond, 341-a radioprelego, 1970.04.22 & 25

Parolas sinjorino Andrée Gacond.

Verŝajne por la lasta fojo mi monologas. Mia edzo Claude Gacond, kiu estis akcidentita, esperas povi reparaĵi al vi ekde la venonta semajno. Mi hodiaŭ legas al vi tekston, kiun li redaktis.

La pasintan semajnon ni vidis, ke, almenaŭ en Svislando, la sinteno de la esperanto-grupoj similas al tiu de la hom-grupoj en la subevoluintaj landoj. La fakuloj, kiuj alportas teknikan helpon en Afriko, Sudameriko aŭ Azio, konsciiĝis, ke la ĉefa kaŭzo de la subevoluo troviĝas en manko de intergrupaj rilatoj.

Por bone kompreni la evoluon de la esperanto-movado, ni devas memori, ke lingvo ne nur estas gramatiko kaj vortaro. Antaŭ ĉio lingvo estas socia fenomeno.

Ofte en la esperantaj medioj oni forgesas, ke la fenomeno internacia lingvo estas socia fenomeno. Ni vidu la ĉefajn etapojn de tiu socia fenomeno.

Multaj diras, ke esperanto naskiĝis en 1887. Estus pli bone diri, ke ĝi estis proponita de doktoro Zamenhof en 1887. Tiam ĝi estis nura lingvo-projekto. Oni listigis centojn da tiaj projektoj de internaciaj lingvoj. La plej famaj estas Universal Glot de Pirro, Volapük de Schleyer, Idiom Neutral de Rosenberger, Ido de Couturat kaj de Beaufront, Occidental de von Wahl kaj Interlingua de Godes.

La diferenco inter tiuj lingvo-projektoj kaj esperanto troviĝas en tio, ke esperanto fariĝis lingvo. La aliaj restis teoriaĵoj.

La interlingvistoj, kiuj kontentiĝas kompari la vortaron kaj gramatikon de esperanto kun tiuj de la ceteraj projektoj de internaciaj lingvoj, kaj restas je tiu nivelo, nenion komprenis en la sukceso de esperanto. Jes, tute, gramatike kaj vortare, esperanto estas originalaĵo. Kaj Zamenhof mem konsciis pri tio. Sed, diskonigante sian projekton, li komprenis, ke la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto komencos disvastiĝi, kapablos progresi kaj sin trudos kiel lingvo inter la parolataj lingvoj, nur se homgrupo identiĝas kun ĝi.

Pro tio li malfavoris la diskutojn pri la lingvo mem kaj favoris la uzon de la idiomu por plej diversaj internaciaj roloj : literaturaj, politikaj, religiaj, idealistaj.

Kiam en 1894 la konservativuloj venkis kontraŭ la reformemuloj, tiam naskiĝis esperanto. La teoriemuloj forlasis tiun projekton por aliaj projektoj, inter alie por Idiom Neutral.

Jaron post jaro kreskos la nombro de la personoj, kiuj fizike, konkrete, subjektive sin sentas ligitaj al esperanto. Dum kontaktoj kun aliaj esperantistoj ili konvinkiĝis, ke la lingvo de Zamenhof estas io interna al ili mem. Tiun senton ili eksimolis per la verda koloro, la kvinpinta stelo kaj la nebulaj asertoj pri la interna ideo.

La eksteruloj, kiuj vidis en esperanto nur lingvon kaj ne la socian fenomenon, tiam nenion komprenis al la mistika entuziasmo de la partoprenantoj de la unuaj universalaj kongresoj. Tiu entuziasmo naskis komunajn farojn, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni iom strangaj, ĉar ni ne plu vivas en la samaj cirkonstancoj. Ĉu anglaj kongresanoj ne maldungis la ĉevalon de la veturilo de gesinjoroj Zamenhof por mem tiri la veturilon ? Tio okazis sur la stratoj en Antverpen en 1911.

La identiĝo, la intimiĝo kun la Lingvo Internacia de Doktoro Zamenhof estis neklarigebla kaj subjektiva fenomeno. Edmond Privat, kiu estis en Boulogne-sur-Mer en 1905 ofte parolis pri la entuziasmo de la tiama esperantistaro, pri la atmosfero de Boulogne-sur-Mer, kiun li komparis al « *la mirakla pentekosta ĝojo* ».

Esperanto estas socia fenomeno, ĉefaj etapoj
Claude Gacond, 341-a radioprelego, 1970.04.22 & 25

Por esti vera esperantisto, oni devas eksperimenti en si mem la vivantecon de la lingvo. Antaŭ tiu persona travivaĵo oni nur teorie, abstrakte povas paroli pri la rolo de la lingvo internacia. Post tiu travivaĵo oni tute aliel priskribas la rolon de esperanto. Oni ĝin sentas konkrete, praktike, subjektive kaj ankaŭ multe pli objektive.

Por reveni al Boulogne-sur-Mer, ni menciuj, ke Louis de Beaufront ne ĉeestis tiun manifestacion. Pro tio, post 1905 li ne plu sentos sin hejme en Esperantio. La esperanta mistiko, kiu respegulis la internaciajn sentojn de la esperanta publiko, restos por li io fremda. Konsekvenco : Louis de Beaufront proponos novan lingvon.

Kiuj, tiam en 1907, forlasos la lingvon de Zamenhof por la Ido-skismo ? Nur tiuj, kiuj ne intimiĝis kun esperanto. Pro tio la Ido-skismo estis profitiga al la movado. Ĝi liberigis nin de la teoriaj diskutoj profite al praktikaj agadoj. Jam en 1908 naskiĝos Universala Esperanto-Asocio.

Ĝis la dua mondmilito la esperanto-vivo ĉefe disvolviĝos en la lokaj kaj naciaj societoj. La esperantistoj malfacile vojaĝis. En la grupoj ili praktikis la lingvon. Tiel ili studis, babilis, korespondadis, aŭskultis raportojn pri la kongresoj.

La sociaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis. En la riĉaj landoj de Okcidento la lokaj grupoj ĉesis ludi ĉefrolon. Kiam gejunuloj en unu somero povas viziti du aŭ tri kongresojn, tiam la vivo en la loka grupo fariĝas iom senkolora.

Tamen la lokaj grupoj kaj naciaj societoj havas ludendan rolon. Ili devas daŭre favori la intimiĝon kun esperanto. Ke la mistiko ŝanĝiĝis, pri tio ne estas dubo. Verdismo, stelismo kaj asertoj pri la interna ideo ne plu vekas la entuziasmon de la nova generacio. Ili atendas, ke la grupoj ekludu teknikan rolon : en ili oni devus povi trovi, kion oni ne havas la tempon trovi en la internaciaj kongresoj.

Ni troviĝos en kriza situacio tiom longe, kiam niaj societoj respegulos emojn, kiuj apartenas al la pasintaj jardekoj.

Sed por koni la novajn emojn de la juna esperantistaro oni devas akcepti la ideon mem, ke la tempoj ŝanĝiĝis. Ni ne estas certaj, ke la gvidantoj de la grupoj en Svislando perceptis tiujn ŝanĝojn. Sen tio ili facile kunlaborus.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Andrée Gacond nome de Claude Gacond, kiu estis akcidentita. Ĝis reaŭdo !

-oOo-